
# Ho, venu Vi, Saĝec' de Di'

VENI, VENI EMANUEL • O-Antifonoj




(18. 12.) 2. Ho Adonai, Leĝ-donint'
el nubo de Sinaja pint':
jam nun al Via Izrael'
revenu Vi, Imanuel!

(19. 12.) 3. Ho Jiŝaj-ido, levu Vin,
el ĉenoj liberigu nin,
kaj savu el la nigra mort'!
Ne venku nin infera fort'!

(20. 12.) 4. Ŝlosil' Davida, venu Vi!
Malfermu hejmon antaŭ ni;
enlasu nin al Dia glor';
malbonon ĉian baru for.

(21. 12.) 5. Ho, venu Vi, Matena Sun'!
Dispelu noktajn ombrojn nun,
lumante al mort-ombra voj',
gajigu nin per sankta ĝoj'.

(22. 12.) 6. Ho Reĝo, bazangula ŝton',
integras gentojn Via tron'.
Vi formis homojn el argil':
Savante venu, Dia Fil'.

(23. 12.) 7. Ho, venu Vi, Imanuel',
ekbrilu super Izrael'
ploranta sola en ekzil',
ĝis venos Vi, la Dia Fil'.

VENI, VENI EMANUEL • O COME, O COME EMMANUEL • ANTIPHONÆ MAIORES, O-Antifonoj • GL 112.2-8 • kp. Unisono 5, HAM 49, HON 358, LBW 34, EM 144 • M: Kantolibro de Andernach, Köln 1608 • latina T: 13a jc., en Psalteriolum Cantionum Catholicorum 1710 • angla T: John Mason Neale 1851/1861 • E: B. John Beveridge, 1966 en HE 26 (strofoj 7, 3, 5, 4, 2*, Albrecht Kronenberger (strofoj 1, 6) • kp. AK 37, ADORU 183 • 2017 en KANTU 38 • ↑ Jes 7,14; Mat 1,23